# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 5 Januaro-Februaro 1985.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Montoyerstrato 37 b24
B-1040 BRUSELO
Tel. (02) 513 59 95
por neurĝaj aferoj

Poŝtĉekkonto 000-0163434-86
por donacoj kaj kostopagoj...

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraroj de B.E.F., F.E.L. kaj A.P.E., ankaŭ de lokaj grupoj, prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

```
        *
       ***
   ***********
    ***BEF***
      *****
     *** ***
    *       *
```

Organigramo de BELGA ESPERANTO-FEDERACIO ĝisdata je januaro 1985 estas mendebla ĉe la sekretario por ĉiu klubo aŭ aktivulo

## KLUBO 100

arangos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto"
Amikoj kaj simpatiantoj kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn !
Unufoja kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ankaŭ... !!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al UKE Varsovio !!! - per Monda Turismo -
Sendu viajn pagojn al Bankkonto 034-0379435-33 de KLUBO 100 !

## KLUBO 100

| | |
|---|---|
| Saldo al konto ĉe FEL (je la fino de decembro 1984) | 8000. |
| Bankinterezoj (CGER ASLK) 1984 al konto de KLUBO 100 | 1060. |
| Imposto | -265. |
| Saldo al konto de KLUBO 100 (je la komenco de januaro 1985) | 35146. |
| Provizora sumo | 43146 BF |

Dankon por la helpo al tiu grava agado !

A. MG.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

### Esperanto ĉe Belga Radio kaj Televido.

Okaze de la Zamenhoffesto, la RTBF intervjuis Emile VAN DAMME, prezidanto de la Esperantista Brusela Grupo, dum tre aŭskultata tagmeza novaĵelsendo "Actualité de Midi". Tiun sukceson ni dankas al la nefatigebla agado de grupano Jacques DE BLOUDTS.

La 22-an de januaro 1985, BRT2 dediĉis la 1-an parton de sia televid-elsendo "De steek er wat van op Show" al enketo pri la uzado de Esperanto, kiun partoprenis Grégoire MAERTENS, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj Kristin TYTGAT, estrarano pri Junularo ĉe la Flandra Esperanto-Ligo.
Tiu interesa elsendaĵo estis ripetota je la 1-a de februaro.

"HAVENO", la bonega gramofondisko de NIKOLIN, partoprenas al muzikaj programoj de belgaj radio-elsendoj. Hazarde, la redaktoro de EB ankaŭ feliĉis vekiĝi per la bela voĉo de Nikolin kelkajn minutojn antaŭ la frumatena novaĵelsendo "Ochtendnieuws" de BRT3.

A. MG.

---

### 7a MONDA KONGRESO PRI APLIKA LINGVISTIKO

De la 5a ĝis la 10a de aŭgusto Internacia Asocio pri Aplika Lingvistiko (AILA) okazigis sian sepan mondkongreson en la Libera Universitato de Bruselo. La kongresa temo estis aparte interesa por parolantoj de Esperanto: "La kontribuo de la aplika lingvistiko al internacia komprenigo".
La partoprenantoj - 1500 lingvosciencistoj kaj aliaj interesitoj el la tuta mondo - diskutis la temaron en ses sekcioj...
Partoprenis la kongreson pluraj esperantistaj lingvofakuloj... François Simonnet (Francio), Edward Symoens (Belgio), Maire Mullarney (Irlando) prelegis. Ankaŭ Lothar Hoffmann (FR Germanio) aludis Esperanton...
Inter la dek ok specialaj simpozioj okazis simpozio pri Esperanto. Edward Symoens prezidis. Kunlaboris François Simonnet, Marc Demonty (Belgio).
Ankoraŭ necesas pli bone organizita partoprenado de esperantistoj en tiaj kongresoj. Ideojn kaj proponojn rilate al tio... bonvenigas Edward Symoens, Putse stwg 131/A, B-2180 Kalmthout.

El "Esperanto" 10.84.

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

**Nekrologo**

ALBERT SAMYN mortis antaŭ kelka tempo en Bruselo. Li estis konata per siaj tradukoj kaj originala prozo, gajninto de multnombraj premioj de Belartaj Konkursoj de UEA... Li estis membro de UEA ekde 1951.

Inf. el "Esperanto" 11.84.

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

### Semajno de Internacia Amikeco - Leuven

Jam estas la 7-a jaro ke Esperanto 2000 organizas la Semajnon de Internacia Amikeco. Tiun ĉi fojon la inaŭguro okazos dimanĉon la 17-an de februaro 1985. La temo estas : Enkonduki komencantojn en la movado.

Françoise Guldentops
vic-sekretariino Esperanto 2000

Mia adreso estas :

De Costerstraat 12
2990 Wespelaar

===============================================================

### 19a MARKOLA KONGRESO - BRUGGE - 19-21 APR. 1985

Markola Kongreso estas ĉiujara renkontiĝo de Esperantistoj el la marbordaj regionoj de Belgio, Britio kaj Francio...
Komence de januaro alvenis 52 aliĝiloj.
Inf. Roland ROTSAERT, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge.

===============================================================

27-an de aprilo - 1-an de majo 1985 S I S
XIII SCIENCA INTERLINGVISTIKA SIMPOZIO en Varsovio.
Organizanto: AKADEMIA CENTRO INTERLINGVISTIKA -
Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL 00-950 WARSZAWA.

---

### ROMANS EN FRANCUJO atendas vin !

INTERNACIA SEMAJNO de la 29a de JUNIO ĝis la 6a de JULIO 1985, kun interesa programo: vizitoj, ekskursoj, diversaj vesperoj..
Inform. GRUPO "BONA STELO" - Rue Premier - 26100 ROMANS (France).

---

18-a IREN - INTERNACIA RENKONTO NATURAMIKA Abaliget 1985-07-22/31
Informoj: DEP. KOM. HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO, Pécs, Pf.2, H-7601

---

# Universala Kongreso de Esperanto

...nenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
... 10 ... 15 39
... ESPERANTO ROTTERDAM
... 62 73 37
... 144, Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam

1985 01 11

70a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Aŭgsburgo (FR Germanio) 85 08 3 - 10

TRIA OFICIALA KOMUNIKO

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio

PREZIDENTO DE FRG AKCEPTAS ESTI ALTA PROTEKTANTO

1. Alta Protektanto

Ekde 1905 la plimulto de la Universalaj Kongresoj ĝuis la protekton de la ŝtatestro de la kongreslando. Aŭgsburgo ne estos escepto; en sia letero al la Prezidanto de UEA, la Prezidento de FR Germanio, d-ro Richard von Weizsäcker, skribis: "Inter la sennombraj aranĝoj, kiuj okazos dum 1985 en la kadro de la dumiljara festo en Aŭgsburgo, la Universala Kongreso de Esperanto okupos eminentan lokon ... Mi volonte prenas sur min la protekton de la Kongreso, por kiu mi deziras bonan kaj sukcesan disvolviĝon".

2. Honora Komitato

La konsisto de la Honora Komitato estas impona kaj prestiĝa subteno de la UK, kiu fortigas la brilon de la Alta Protektanto. Inter la plurdeko da nomoj estas la prezidantoj de la federacia parlamento, d-ro Jenninger, kaj la provinca parlamento de Ŝvabio, s-ro Dörr; la federacia Ministro pri Ekstero, s-ro Hans Dietrich Genscher; federaciaj, provincaj kaj eŭropaj parlamentanoj; provincestro, ĉefurbestro kaj senatanoj; episkopo kaj dekano, rektoro de la universitato de Aŭgsburgo kaj aliaj. Oni ankoraŭ ne ricevis ĉiujn respondojn al la invitoj, sed la indiko estas, ke 80% de la invititoj akceptos kaj estos bona selekto de eminentaj reprezentantoj de la diversaj politikaj, religiaj kaj alispecaj sociaj agadoj de la kongreslando.

3. Alvoko al artistoj

Dum la UK oni planas publikan prezentadon de Esperanto-kulturo sur la urba placo de Aŭgsburgo dum tri-hora posttagmeza spektaklo, parte por montri al la ekstera mondo la tutmondecon kaj diversecon de Esperanto kaj ĝia kulturo, parte por fari dankdonacon al la urbo, kiu gastigas la UK.

Estas dezirinde prezenti la buntecon kaj diversecon de naciaj, folkloraj kostumoj por fari okulfrapan spektaklon; krome estas klare, ke la prezentaĵo devas esti ĝenerale komprenebla aŭ ĝuebla eĉ por ne-esperantistoj, kvankam estos dulingva ceremoniestro.

Ĉiuj, kiuj aliĝas al la UK estas petataj konsideri proponi sin por ĉi tiu festivalo; oni antaŭvidas maksimuman longecon de dek minutoj por ĉiu unuopa ero. Sendu vian proponon al unu el la supraj adresoj.

4. Dua Bulteno

La Dua Bulteno estos dissendita al aliĝintoj en la komenco de februaro. Ĝi celas esti komprenebla kaj facile uzebla eĉ por unuafoja kongresano. Ĝiaj 48 paĝoj entenas informojn pri la mendeblaj loĝado, ekskursoj, aliaj kongresoj, bankedo, Cseh-kursoj, Internaciaj Ekzamenoj; pri la Belartaj Konkursoj de UEA, FR Germanio, kaj multaj ĝeneralaj aferoj; kaj pri la Kongresa Temo, kongresaj perantoj kaj aliaj utilaj sciindaĵoj. Novaĵo estas la publikigo de provizora programskemo por faciligi la planadon pri mendado de ekskursoj.

5. Turismo

Multaj kongresanoj profitas de la UK ĉiujare por ekskursi en la kongreslando. Jam en antaŭa komuniko ni informis pri la vastaj eblecoj ekskursi ne nur dum la kongresa semajno mem, sed en la oficialaj Antaŭ- kaj Postkongreso. Kiel menciite supre, la Dua Bulteno havas skemon de la disvolviĝo de la kongresa programo, kiu montras la ĉefajn programerojn kaj la horojn de la diversaj ekskursoj kun la celo eviti kelkajn konfliktojn, kiuj kutime ne estas antaŭvideblaj, kiam oni mendas ekskursojn.

6. Loĝado

Aldone al la informoj en la Dua Komuniko pri loĝado en Aŭgsburgo, estas rimarkiginde, ke la mendilo por loĝado ĉi-jare estas sendebla al la Loĝiga Servo sen antaŭpago. La urba turisma buroo sendos al la mendinto dulingvan konfirmilon, kiun oni portu al la loĝejo mem. Pago okazos surloke, rekte al la hotelestro; LKK petos peradkotizon de po 3 GM en la kongresejo.

7. Kotizoj kaj kategorioj

Ekde nun ĝis la 14-a de majo validas la dua kotizperiodo, dum kiu la kotizoj estas jenaj: Kat. 1 (ne-membro de UEA) - 188 gld; Kat. 2 (individua membro de UEA) - 156 gld; Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA) - 125 gld; Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ja estas membro de UEA) - 94 gld.

Ni atentigas, ke Simpla Abonanto (Ja) de la revuo "Esperanto" NE estas membro de UEA. Krome, tiuj, kiuj aliĝas laŭ kat. 1 NE ricevas la revuon dum la kongresa jaro kiel okazis ĝis 1983.

8. <u>Statistiko</u>

En la transjaraj tagoj venis al la CO tiom grandega lavango da aliĝiloj, ke ne eblas doni precizan laŭlandan analizon. Necesos semajnoj por trakti ĉiujn, ĉar en kelkaj tagoj la nombro de la aliĝojduobliĝis! Kvankam ni bedaŭras, ke kelkaj aliĝintoj devos atendi iom pli longe antaŭ ol ricevi sian konfirmilon, ni ĝojas povi anonci, ke la nombro de aliĝoj en la mezo de januaro estis ĉirkaŭ 1100.

================================================================

71-A U N I V E R S A L A K O N G R E S O
Pekino, Ĉinio, 26 jul - 2 aŭg 1986

Plia favora tarifo, valida ĝis 15 aŭgusto, 1985!

Jam kvincento da aliĝoj venis laŭ la escepte favora tarifo, kiu validis ĝis la fino de 1984. La Estraro de UEA nun fiksis novan tarifon, kiu estas sub la tarifo de la unua kotizperiodo, kiu validos ekde 16 aŭgusto, 1985. Jen la kotizoj:

| | |
|---|---|
| Kat. 1 (ne-membro de UEA) | 150 gld |
| Kat. 2 (individua membro de UEA) | 120 gld |
| Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA) | 90 gld |
| Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ja estas membro de UEA) | 60 gld |

La nederlanda Guldeno nuntempe valoras ĉirkaŭ 18 belgajn Frankojn



L I N G V O B O R S O / L I N G V O F O I R O

La 8a Internacia Lingvoborso okazos ĉijare vendredon, la 15an kaj sabaton , la 16an de marto. Vendrede, 10H00 - 10H00 kaj sabate 09H00 - 18H00.

Ejo: Anspach Center, inter la Borso kaj la placo De Brouckère, facilege atingebla per metroo. Pluraj vastegaj aŭtoparkejoj estas en la ĉirkaŭaĵo.

La Brusela Grupo prizorgos la standon kaj invitas ĉiajn kunlaborantojn aŭ vizitantojn.

D O N A C O I N T E R N A C I A L E R N E J A S E M A J N O

En IPR 1984/2 oni anoncis la kreadon de Internacia Lerneja Semajno-Fonduso kaj alvokis tiucele la samideanojn al mondonaco.
S-ino E. ERNST respondis malavare al tiu alvoko ĝirante grandegan sumon favore al la Fonduso.

I N S T R U A D O

OFICIALA SITUACIO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO EN LA MONDO

La 5a ĝisdatigita eldono de tiu 20-paĝa broŝuro ĵus aperis kaj estas havebla ĉe la kompilinto, s-ro G. Pirlot. En ĝi vi trovos ĉiujn informojn pri adresoj de lernejoj kaj instruistoj, pri la kursoj kaj ilia oficiala statuto en la koncerna lando.

Ĉe la EUROPA KOMUNUMARO

Kelkaj oficistoj en la servoj de la Eŭropa Komunumaro jam eklernis esperanton kaj reklamadas en la sino de tiu instanco, inter alie pere de la ena deĵorantara revuo.
En januaro okazos plia paŝo antaŭen. Dank'al la energia kaj daŭra agado de nia samideano Michael CWIK, oni aranĝos duonrapidan kurson por deko aŭ dekkvino da partoprenantoj. La kurso doniĝos vespere dum du semajnoj kaj baziĝos sur la Zagreba metodo. La kursgvidantoj estos s-roj M. Demonty kaj E. Van Damme.

En la VUB ( V R I J E U N I V E R S I T E I T B R U S S E L)

Dank'al la klopodoj de s-ro E. Symoens, la administrantara konsilio de la VUB konsentis ke 3-jara eksperimenta kurso organiziĝu ekde oktobro 1985. La kursgvidanto estos E. Van Damme. Dum la venontaj monatoj ni provos per ĉiuj eblaj rimedoj sensitivigi la studentan medion pri la iniciato, por ke almenaŭ kelkaj kursaniĝu ! Samideanoj kiuj konas persone studentojn de la VUB bonvolu atentigi ilin pri la afero !

En la U N I V E R S I T A T O D E M O N S

Estas kuraĝige ke ankaŭ en tiu universitato signoj de interesiĝo pri Esperanto montriĝas. Dank'al la klopodoj de s-ro E. Symoens, denove, la ebleco de universitataj pristudoj pri E° progresive konkretiĝas.

La 18a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazis en Skofja Loka. La konferenco havis 102 partoprenantojn el 11 landoj...

El "Esperanto" 10.84

---

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ (I.L.E.I.)
19-a Internacia Konferenco Kungälv(Svedujo) - 22-29 julio 1985
L.K.K. Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby(Sv)

---

Esperantotur
TURISMA SERVO DE MONDA TURISMO
eldonis sian Internacian Programon 1985.
Inf. ESPERANTOTUR-BENELUKSO, Schotlandstr. 73, B-1060 BRUSELO.
"Esperanto en Belgio" ankaŭ rememoros la plejmultajn arangojn en sia kalendaro pri "Naciaj kaj internaciaj renkontigoj".

---

NACIAJ KAJ INTERNACIAJ RENKONTIGOJ

1985

| | |
|---|---|
| Tutjare | Esperanto-staĝoj - la Chaux-de-Fonds CH |
| | Konstanta Internacia E-Lernejo - Bydgoszcz PL - kursoj, vizitoj, ekskursoj |
| | Internacia Esperanto-Kursejo - Pisanica BG - edukaj, klerigaj aktivecoj, prelegoj, kantadoj, aŭdvidaj arangoj, filmoj, spektakloj, dancadoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj, studaj vojaĝoj |
| 12-25.01 | Internacia Vintra Esperanto-Feriado - Zakopane PL - kursoj, konkursoj, ekskursoj, spektakloj, dancoj... |
| 21.01 | Elsendo pri Esperanto ĉe BRT2, B. |
| 24.01-17.02 | Internacia Kurso-Karavano por Esp.-Vojaĝgvidantoj - Londono, Bruselo, al Bydgoszcz PL - prelegoj, ekskursoj. |
| 01.02 | Elsendo pri Esperanto ĉe BRT2, B. |
| 17.02 | Semajno de Internacia Amikeco, Inaŭguro - Leuven B - prelegoj, lumbildoj... |
| 21-25.03 | Konferenco pri publika klerigado - Budapesto H - prelegoj, lerigaj vizitoj |
| 22-26.03 | Teatra Festivalo - Budapeŝto H |
| 30.03-06.04 | Internacia Esperanto-Semajno - Nice F - kursoj, diskutoj, ekskursoj, kultura arango... |
| 31.03-06.04 | Internacia Renkonto de Infanoj - Grésillon-Baugé F kursoj, distraĵoj |
| 03-10.04 | Paska Karavano al la 69a Brita Esperanto-Kongreso - Bruselo-Londono + reveno |
| 05-12.04 | 1-a PSI= Printempa Semajno Internacia - Bielefeld D - muziko, filmoj, lumbildoj, video, teatro, arta manlaboro, lingvokurso, komputila kurso... |
| 11-14.04 | 2a Internacia Metodika Seminario - Radziejowice PL - prelegoj pri E-instruado |
| 14-20.04 | Internacia Cseh-Seminario por Esperanto-Instruantoj - Bydgoszcz PL - prelegoj, provlecionoj... |
| 19-21.04 | 19a Markola Kongreso - Brugo B |
| 15-05 | Jarkunveno de F.E.L. Eo Domo Antverpeno, 14a h. |

---

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 5 Marto-Majo 1985.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Montoyerstrato 37 b24
B-1040 BRUSELO
Tel. (02) 513 59 95
por neurĝaj aferoj

Poŝtĉekkonto 000-0163434-86
por donacoj kaj kostopagoj...

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraroj de B.E.F., F.E.L. kaj A.P.E., ankaŭ de lokaj grupoj, prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

## KLUBO 100

aranĝos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto". Amikoj kaj simpatiantoj kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn ! Unufoja kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ..!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al UKE Varsovio 1987 !! per Monda Turismo.
Vi povas sendi la pagojn al bankkonto 034-0373435-33 de KLUBO 100 ! aŭ al konto de BEF, FEL aŭ APE, menciante sur la pagilon "Donaco por KLUBO 100" (BEF mem povos sendi al vi laŭleĝan ateston por rabato je viaj impostoj )
NE HEZITU ! Ekagu nun por ke 1987 vere iĝu la jubilea jaro de Esperanto !!
Jam plurdekoj da donacintoj antaŭiris vin. Ni esperas atingi almenaŭ 100 !
Kiuj gesamideanoj volas ke siaj nomoj ne aperu en la liston ? !!!!

KLUBO 100

Listo rekte donacintoj (1000 F ol pli)
$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1985 | DEMARCHE Raymond | 1000 | | |
| | LEROY Lucy | 1000 | | |
| | Totalo | 2000 | Saldo de la bankkonto 37146 | Saldo al konto de FEL 8000 |
| Totala saldo de la kontoj | | 45146 | | |

Dankon por la helpo al tiu grava agado !
A.MG.

---

## eùropa esperanto-centro

informas la Esperantistojn ke granda Europa Manifestacio okazos en Milano (I), sabaton la 26-an de junio. Specialaj vagonaroj iren kaj reen nokte transportos partoprenontojn . Kotizo de 2500 BF por la veturado kaj la tuttaga aranĝo. Informiĝu tuj ĉe F-ino Anne TILMONT, (Eùropa Esperanto-Centro) tel. 03/2336681 aù ĉe S-ino Van Holm (Eùropa Komisio) tel. 02/2356237.

---

### Interkibernetik '85

La Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko kaj Sistemiko (TAKIS) okazigos sian unuan universalan kongreson en Budapeŝto de 27-07 ĝis 2-08-1985.
La kongreso estas gastigata far la Komputo-scienca Societo Johano Neumann, kiu organizis la kongreson INTERKOMPUTO en 1982 kaj partoprenas en la redaktado de la internacie konata revuo Internacia Komputado. La Internacia Kibernetika Asocio - sidejo en Namur, Belgio - kaj la Kibernetika Akademio Oblodeja planas subteni tiun kongreson. Inform: NJSZT, H-1368 Budapest, Pf. 240, Hungario.

---

### 3' SUNA-MARA INTERNACIA FERIO-SEMAJNO

1985.07.06-13. La fervojista Esperanto-Grupo 'Fata Morgana' de REGGIO CALABRIA invitas ĉiujn partopreni ferio-semajnon ĉe plej belaj mediteraneaj strandoj. Informoj: Domenico FIUME, Via Nazionale 80, I-89051 ARCHI Reggio Calabria.

===

RENNA ESPERANTO-KLUBO INTERNACIA SEMAJNO PRI INFORMATIKO
1-6a julio 1985 en Bretonio
Inf. Christian BERTIN, 60, allée de la Renaudière, F-35510 CESSON-SEVIGNE.

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

9-A INTERNACIA PILGRIMADO ESPERANTISTA AL LA VIRGULINO DE MALRIĈULOJ EN BANNEUX (apud LIEGE). Inf: Sac. L. Muller, 207 rue Fr. Lefebvre, 4420 Liège

+++++++++++ IKUE +++++++++++ IKUE ++++++++++ IKUE ++++++++++ IKUE +++++++++++
P. A. BECKERS, Rozenl. 5, 3950 Beringen tel. 011/42.10.78, dumviva honora Prezidanto de IKUE, festos sian 50jaran sacerdotecon la 29an de junio 1985.
La Esperantomovado partoprenu lian ĝojon !
+++++++++++ IKUE +++++++++++ IKUE ++++++++++ IKUE ++++++++++ IKUE +++++++++++



# NI GRATULAS

Ne nur en Belgio estas konata Honora Prezidanto de J.K.U.E. p. A. Beekers. Li naskiĝis la 15-an de decembro 1908 en Beringen. Ĉiam fidela al sia naskiĝregiono. Jam en 1925 ekkomencis lerni Esperanton. Dek jaroj poste sacerdotiĝis kaj fariĝis aktiva de 1935 jaro, kiel religia konsilanto de F.U.K.E (Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj) 1935 - 1940. En 1938 j. elektita estrarano de I.K.U.E. (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), kaj iĝis vic-prezidanto 1945 - 1950. De 1950 ĝis 1965 estis prezidanto de I.K.U.E. Ek de 1965 estas dumviva honora prezidanto. Kaj daŭre aktiva estrarano de tiu Unuiĝo. Krome ek de 1935 li estas membro kaj delegito de UEA.

En tiu plej koncize priskribo de lia senĉesa, longdaŭra agado en esperanta kampo ne eblas citi liajn meritojn. Pro lia bonkoreco kaj sinoferemo por aliaj, li iĝis konata inter junuloj kaj pli aĝaj en esperanta mondo.

Okaze de lia 50-jara sacerdoteco, kiun li festos la 29-an de junio 1985 en Beringen ni esprimu nian ĝojon kun dankvortoj kaj gratulojn!

Barbara

## ĈIU TRIA EKZEMPLERO SENPAGE

La Librejo de Eldonejo & Librejo **Sonorilo** donas rabaton al ĉiu aĉetanto de minimume 3 ekz. de la sama libro. Por la propraj eldonaĵoj — kaj por pluraj aliaj libroj — tiu rabato estas 30%, kio signifas, ke ĉiu tria ekzemplero estas senpaga! Jen la libroj:

Espéranto dans l' enseignement, L: D-ro Pol Denoël. 1982. (2a reviziita eld.). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. Prezo: 100 Bfr.

Initiation théorique et pratique: D-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj pri gramatikaj konceptoj. Lernolibro plej taŭga por publikaj kursoj! Prezo: 250 Bfr.

Guido Gezelle: (1830-1899). Red. B. Peleman. 1980. 112p. Ilus. 31cm. Bind. Luksa, grandformata, bele ilustrita poemkolekto de la plej fama flandra lirikisto de la 19a jarcento. Kun originaloj kaj tradukoj en 12 lingvoj, inkluzive Esperanton. Prezo: 890 Bfr.

Universala skribo: M. Halvelik. 128p. 21cm. (Normlingva serio 2). Provo de unueca ortografio por ĉiuj lingvoj. Prezo 150 Bfr.

disko

Esperanto kaj libereco: Tekstoj de Max Roy Carrouges; muziko de T. Turens. 1982. ARN 34666. Duflanka, stereofona disko kun Esperanta teksto. 30cm. 33 t/m. Orkestron direktas Jean-Claude Passaga. Kantas M.R. Carrouges. Bele eldonita grandformata disko kun 12 originalaj kantoj. Prezo: 425 Bfr.

diversaĵoj

Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto: 16,6x7cm. Verda kaj nigra preso sur blanka kaj verda fono, kun verda stelo. Prezo: 25 Bfr. (minimuma mendokvanto: 10 gluafiŝoj por ricevi rabaton)

Kartoj por la nova jaro: Serio de 4 diversaj koloraj kartoj en 5 lingvoj (kun kovertoj): Esperanto, nederlanda, franca, germana kaj angla. Prezo: 60 Bfr.

### AŬTOROJ-ELDONISTOJ!

Ĉu vi serĉas metodon por eldoni malmultekoste verkon por limigita publiko? Eble Eldonejo & Librejo **Sonorilo** scias solvi vian problemon! Ekzemple: fakulo havas bone tajpitan manuskripton 50-paĝan de teknika terminaro, kun desegnaĵoj, formularoj, tabeloj ktp. Li taksas, ke ekzistas nur ĉirkaŭ 50 potencialaj aĉetontoj. Presigi 50 ekzemplerojn plumbe aŭ ofsete estus ege multekoste. Mimeografado estus malfacila, temporaba kaj ne tre bonkvalita. Sed li sendas la pretan tajpaĵon al Eldonejo & Librejo Sonorilo, kun desegnaĵoj ĝuste surgluitaj, kaj ricevas "poŝtrevene" 50 perfektajn kopiojn de ĉiu paĝo, sur ambaŭ flankoj de normala blanka aŭ kolora papero. La kosto? Nur 5000 Bfr, t.e. po 100 Bfr por ĉiu kompleto - plus sendokostoj. Petu oferton ĉe Eldonejo & Librejo **Sonorilo**!



## El "ILEI-INFORMILO" 03.85.

Labordokumento : Superrigardo pri nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto-ekzamenoj en Belgio

---

Nuntempe ne ekzistas nek en tuta Belgio, nek sub aŭspicioj de FEL, AFE aŭ ILEI unuigita, relative homogena ekzamenado de Esperanto-kursanoj. Tio tamen estus utila, por doni pli seriozan karakteron al niaj kursoj, kaj eĉ iam por eventuala oficialigo.

Lastatempe pli kaj pli regule aŭdiĝis voĉoj (i.a. S-ro Rabosée, kunveno en Xhoris,apr. 84 ), kiuj proponis starigi komisionon, kiu okupiĝu pri tio.

En la 4 ĝis nun okazintaj kunvenoj de KLUBOIOO , la problemo estas priparoli jene :

- Je 19/II/83, oni proponis utiligi la diplomojn de UEA, kaj do okazigi la ekzamenojn laŭ ĝia regularo. Post nura sondado, jenaj nomoj estas proponitaj kiel ekzamenontoj/ Ivo Durwael, E.Van Damme, M.Demonty, C. De Clerck, A.Staes.
- Je 21/I/84, Jan Bovendeerd sugestis peti antaŭsubskribitajn diplomojn de UEA, sed organizi ĉion inter ni. UEA povus ankaŭ disponigi demandarojn (?) (B.Ragnarsson).
- Je 12/5/84, montriĝas, ke la kontaktitaj ekzamenontoj aŭ rezignas pri la proponita tasko, aŭ ne aperas, krom M.D.La afero do ne progresas.
- Je 20/10/84, JB transdonas al MD la atestilojn ricevitajn de UEA. Tamen pro malĉeesto de aliaj ekzamenontoj kaj tempomanko, ne estas aliaj konkretaj paŝoj.

Okaze de kernkunveno de ILEI( E.Symoens, E.VanDamme, G.Pirlot, M.D.) je 26/I/85, la problemo estas relanĉita. Decidiĝas priparoli la sekvotan vojon en ampleksigita kunveno je 28/4/85 en Bruselo.

Provizore estas adoptita jena laborplano :

- Necesas formi laborpretan komisionon de ekzamenontoj .
- K.100 povus interveni en la financado ( vojaĝaj elspezoj ), ĉar la financa stato de la ILEI-sekcio ne tolerus tion.
- Necesas prepari programojn ( disponigeblajn al ĉiuj kursgvidantoj ) kaj demandarojn .
- La atestiloj povos temi pri elementa, meza aŭ supera niveloj ( tamen la UEA-atestilo temas nur pri la du unuaj ).

M.Demonty, febr. 85.

........................... F L E J A ...........................

E S P E R A N T O - S E M A J N F I N O

J U N U L O J kaj A R T O

8-9-10 novembro 1985 MERKENVELD

Aliĝiloj ĉe Ilse JACQUES, Molenstr. 29, 2018 Antverpeno.

!!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!! UKE !!!!!!!

KARAVANO AL LA 70-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO: Aùgusto 01 - Aùgusto 12

Mendu programon: Esperantotur-Benelukso, Schotlandstr. 73, B-1060 BRUSELO.

!!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!! UKE !!!!!!!

70-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
3-10 aùgusto 1985
Aùgsburgo, FRGermanio.

Aliĝis 1683 homoj el 49 landoj ĝis la mezo de majo 1985.
Se ankaù vi partoprenos: Bonvolu (peti kaj) resendi aliĝilon kaj pagi al via landa peranto, kiu por Belgio estas la Belga Esperanto-Federacio... p/a la kasisto J. Verstraeten, St.-Bernardsestw. 1078, B-2710 Hoboken.
Laù nuna kurzo de Guldeno ĉe la plimultaj bankoj en Belgio (18,08 BF.), ni indikas ĉisube la kongreskotizojn en nia nacia mono:

| Kongreskotizoj validaj post | 85-05-14 |
|---|---|
| 1. Ne individua membro de UEA | 3400 BF |
| 2. Individua membro de UEA | 2820 BF |
| 3. Kunulo/junulo/handikapulo ne individua membro de UEA | 2260 BF |
| 4. Kunulo/junulo/handikapulo individua membro de UEA | 1700 BF |

La kurzo ĉe ASLK/CGER estas meze pli avantaĝa...Krome kurzoj de valutoj daùre ŝanĝiĝas! Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aù malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos). Tamen por malgrandigi la riskojn por la peranto, la aliĝontoj povus pagi rondan sumon aù aldoni donacon por la Federacio.
Anticipan dankon! A.MG.

Postkongresa Vojaĝo tra Aùstrio 11-a - 17-a de aùgusto 1985.

Informilo-aliĝilo ĉe Max Finkenzeller (Monda Turismo Esperanto), Troststrasse 27/10/2, A-1100 Wien. Tel. 0222/6283443.
El **ESPERANTO-SERVO** de la Aùstria Esperantista Federacio.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

* VINTRO EN ORA PRAHA
kiu okazos 15.12.-20.12.1985 en hotelo International en Praha
ofertas interesajn ekskursojn, fakajn prelegojn, amuzajn vesperojn.
Adreso: Fervojista sekcio de Ĉeĥa Esperanto Asocio 110 01 Praha 1, Jilskà 10.



!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

NACIAJ KAJ INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

1985

| | |
|---|---|
| Tutjare | Esperanto-staĝoj - la Chaux-de-Fonds CH |
| | Konstanta Internacia E-Lernejo - Bydgoszcz PL - kursoj, vizitoj, ekskursoj |
| | Internacia Esperanto-Kursejo - Pisanica BG - edukaj, klerigaj aktivecoj, prelegoj, kantadoj, aùdvidaj aranĝoj, filmoj, spektakloj, dancadoj, instruaj ekskursoj kaj vizitoj, studaj vojaĝoj |
| 15-30.06 | Neformala Internacia Renkonto - Grésillon-Baugé F - Eblecoj: kursoj, ekskursoj... aù ripozo ! |
| 28.06-05.07 | Somera Esperanto-Universitato SEU - Gyula H - diskutoj, prelegoj, vizitoj, ekskurso, lingvokursoj, ekzercado, ekzamenoj |
| 28.06-23.07 | Internacia Kurso-Karavano por Esperanto-Instruantoj - el Londono-Bruselo al Bydgoszcz PL - prelegoj, provlecionoj, ekskursoj... kaj Torun PL, pentroarto. |
| 29.06-06.07 | Internacia Semajno - Romans F - vizitoj, ekskursoj, kantoj, orkestro, lumbildoj... |
| 30.06-21.07 | Prelegoj kaj Kursoj - Grésillon-Baugé F |
| 01-06.07 | Eùropa Junulara Semajno - Strasburgo F |
| 01-06.07 | Internacia Semajno pri Informatiko - Bretonio F |
| 06-13.07 | 3a Internacia Ferio-Semajno - Reggio Calabria I - ekskursoj, danco... |
| 14-27.07 | Karavano por Pentroamatoroj - Toruñ PL - Bruselo B |
| 15-25.07 | Internacia E-Ŝakfestivalo - Târgovişte BG |
| 18-22.07 | Bicikla Karavano al la IJK - |
| 21-27.07 | Internacia Somera Esperanto-Universitato ISEU - V. Târnovo BG |
| 22-29.07 | 19-a Konferenco de ILEI - Kungälv S |
| 22-31.07 | 18-a IREN, Internacia Renkonto Naturamika - Abaliget H - kursoj, ekskursoj, popoldancoj... |
| 22.07-11.08 | Kursoj - Grésillon-Baugé F - kursoj, teatro... |
| 22-29.07 | 41-a Internacia Junulara Kongreso - Eringerfeld D - diskutoj, konkursoj, ekskursoj, koncerto... |
| 27.07-03.08 | 11-a Konferenco de Neùtrala Esperanto-Movado - Metz F |
| 27.07-03.08 | 58-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda SAT - Amersfoort NL laborkunsidoj, ekskurso |
| 27.07-02.08 | 53a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj - Aùgsburgo D |
| 27.07-02.08 | Interkibernetik '85 - Budapest H - prelegoj. |
| 27.07-02.08 | Ekumena Kongreso - Aùgsburgo D |
| 27.07-02.08 | Antaùkongreso Ferisemajno - Oberkirch D - ekskursoj, vizitoj |
| 29.07-03.08 | Biciklado de IJK al UK - |
| 31.07-01.08 | Seminario pri Gvidado kaj Informado en Landaj Asocioj - Aùgsburgo D - prelegoj, debatoj |
| 01-12.08 | Karavano al la 70a Universala Kongreso de Esperanto - el Londono-Bruselo al Aùgsburgo D ... |
| 03-10.08 | 70-a Universala Kongreso de Esperanto - Aùgsburgo D kunsidoj, kursoj, ekzamenoj, nacia, arta, muzika, teatra spektakloj, ekskursoj... |
| | 22-a Internacia Infana Kongreseto - Aùgsburgo D - vizitoj, ekskurso, dancado, kantado... |

* SOMERA ESPERANTO UNIVERSITATO * GYULA HUNGARIO *
28.VI-05.VII.1985
Adreso: SEU, GYULA, 48-as u. 11. H-5700.

Silueta pupteatra arto.

Helen Rowena MacGill estas Novzelandanino kiu antaŭ kvin jaroj starigis siluetan kompanion, kaj nun planas vojaĝon ĉirkaŭ Eŭropo dum Julio kaj Aŭgusto 85. La ĉefa celo de la vojaĝo estas partopreni en la Internacia Pupteatra Festivalo en Zagreb inter 24 Aŭgusto kaj 1 Septembro. Antaŭe, ŝi tre deziras fari prezentaĵojn en tiom da landoj kiom eble, kaj estus tre dankema se oni povus sciigi ŝin pri festivaloj ktp. dum Julio kaj Aŭgusto, kaj pri eblecoj partopreni ilin !
Inf. H.R. MacGill, Fujima 345-106, Kawagoe, Saitama, 356 Japanio.

******************

Deziras korespondi !
===================

István Mády, H-8600 Sibfok, kele 26.

Maholányi József, Nógrádkövesd, Május 1 út 14, H-2691, Hungario.

Eva Vigyikán, 5900 Orosliára, Rákóczi u. 1, B.III.9, Hungario.

Milosz Wróblewski, ul. Malczewskiego 35/35, 93154 Lódź, Pollando.

Ryszard Djakow, 41902 Bytom, Pl. Woj. Polskiego 7/67, Polska.

Michael Zammit, 35 St. Joseph Str. Żebbuġ, Malta.

Pliaj precizoj estas haveblaj de BEF kontraŭ respondkupono

KSM

Universala Esperanto-Asocio povas helpi vin korespondi kun parolantoj de Esperanto; UEA proponas al vi apartan servon: KORESPONDA SERVO MONDSKALA, ĉe S-ro R. Llorens "Les Hortensias 2" 121bis, bvd. Napoléon III, F-06200 NICE

Vi ankaŭ povas peti korespondantojn per anonceto en la internacia revuo Esperanto, aŭ en la junulara gazeto Kontakto, se vi sendas la tekston kun la pago al la redaktoro ("E" aŭ "K"),Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

########## UEA ########## UEA ########## UEA ########## UEA ##########

Nova ĉina Asocio deziras kontakti kun fakuloj ĉu koresponde ĉu renkontiĝe ...
S-ino Wang Yuchun, Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio
de la Cina Akademio de Sciencoj, Fuxingmenwei Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

Alvoko !

Asistanto en Budapeŝta Instituto volus labori en belga hospitalo.
Eble iuj Esperantistoj povus helpi aŭ konsili ? (s) Herman D.
Fino Magdolua Nagy, H1125 Budapest, KútVolgyi u. 16.

?????????????????????

** 15-22.08.0985 Somera Esperanto-Lernejo **
Studenta Esperanto-Rondo RU ZSP de Jagielona Universitato invitas al Krakovo en sudo de Pollando. Inf. Franz Kruse, Mathildenstrasse 73, D-2800 Bremen 1.

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 5 Junio-Julio 1985.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 b24
B-1040 BRUSELO

Poŝtĉekkonto 000-0163434-86 por donacoj kaj kostopagoj...
Tel. (02) 513 59 95 por neurĝaj aferoj

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraroj de B.E.F., F.E.L. kaj A.P.E., ankaŭ de lokaj grupoj, prizorgu la materialon por la bulteno.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj !

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

## KLUBO 100

aranĝos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto". Amikoj kaj simpatiantoj kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn ! Unufoja kotizo minimuma 1000 BF rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ..!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al UKE Varsovio 1987 !! per Monda Turismo. Vi povas sendi la pagojn al bankkonto 034-0379435-33 de KLUBO 100 ! aŭ al konto de BEF, FEL aŭ APE, menciante sur la pagilon "Donaco por KLUBO 100" (BEF mem povos sendi al vi laŭleĝan ateston por rabato je viaj impostoj) NE HEZITU ! Ekagu nun por ke 1987 vere iĝu la jubilea jaro de Esperanto ! Jam plurdekoj da donacintoj antaŭiris vin. Ni esperas atingi almenaŭ 100! Kiuj gesamideanoj volas ke siaj nomoj Ne aperu en la liston ? !!!!

**** BEF ******** BEF ******** BEF ******** BEF ******** BEF ******** BEF ****

Malpligrandiĝo de impostoj pro la donacoj

Agrabla novaĵo por niaj gedonacantoj

BEF denove sukcesis akiri la permeson havigi al siaj gedonacintoj (minimuma donaco de 1000 F) ateston por malpligrandiĝo de impostoj.
Ni invitas la belgajn esperantistojn konsideri tiun fakton por malavare helpi al la disvastigado de Esperanto !

J.V.

==== EEC ======== EEC ======== EEC ======== EEC ======== EEC ======== EEC ====

Donacoj-Kontribuoj por Eŭropa Esperanto-Centro.
Temas pri la sumoj kiujn BEF transdonis al EEC.

| | | |
|---|---|---|
| Stella DE WEERD | BF | 500. |
| Umberto BROCCATELLI | BF | 1000. |
| MAKKINK | BF | 1780. |
| Nederlanda Esperanto-Asocio | NGD | 200. |
| Arpad LŐDŐR | BF | 500. |
| Deutscher Esperanto-Bond | BF | 16090. |
| Itala Esperanto-Asocio | BF | 3494. |
| CAESTECKER Monique | BF | 500. |
| MAKKINK | BF | 1784. |
| RABOSEE Gaston | BF | 200. |
| LŐDŐR Arpad | BF | 500. |
| DECEUNINCK-BOLLAERT | BF | 60. |
| LEPAGE Georges | BF | 100. |

Al ĉiuj donacintoj kaj helpantoj ni esprimas nian koran dankon !
Por ebligi sian propagandon en la plena teritorio de la Eŭropa Komunumo, EEC ĉiam volonte akceptas kontribuojn pere de la belga p.ĉ.konto 000-0163434-86 de BEF, Montoyerstrato 37 b 24, 1040 Bruselo - Belgio.
Bonvolu ĉiam mencii ke la kontribuo celas Eŭropan Esperanto-Centron.

J.V

---

La 7a FLEJA-Renkontiĝo en De Pinte
okazis de 2a ĝis 4a de novembro 1984: ĉeestis krom belgoj ankaŭ britoj, germanoj, nederlandanoj, hispanoj, jugoslavoj, greko, polo, kaj eĉ usonanoj entute proksimume 75 Esperantoparolantoj... La programo estis escepte riĉa.
Inf. André Ruysschaert en "Novaĵletero" 11.84.

---

Esperanto-kursoj en Belgio

povas okazi kiel parto de la oficiala programo "Instruado por Socia Promocio", laŭ kiu lernantoj rajtas subtrahi studhorojn de siaj laborhoroj=
Informojn donas d-ro P. KEMPENEERS, Grote Markt 3, B-3300 Tienen.

---

**III-a Kooperativa EsperantoKonferenco okazos en Plovdiv/Bulgario inter la 27a** kaj 30a de septembro 1985. Por pliaj informoj, turnu vin al:
Centra Kooperativa Unuiĝo, Strato "G. Rakovski" 99, 1000, Sofia Bulgario.

---



**Ek al Polland' !**
POLA STUDENTA ESPERANTO KOMITATO INVITAS PARTOPRENI EN LA
!!! PSEK aranĝo 1985.08.09-16 !!! en Krakovo.
Inf. Franz KRUSE, D-2800 Bremen 1, Mathildenstr. 73, Tel. 0421-71996.

()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()()

KUNLIGE KUN LA SESA GENERALA ASEMBLEO DE LA MONDA TURISMA ORGANIZAĴO, UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, INTERNACIA ASOCIO "MONDA TURISMO", KAJ BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO ORGANIZAS DE LA 11-a ĜIS LA 16-a DE SEPTEMBRO '85 EN LA INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO, PISANICA KAJ SOFIO - BULGARIO INTERNACIAN SIMPOZION "LA LINGVAJ OBSTAKLOJ AL LA LIBERA EVOLUADO DE TURISMO"
BULGARIO, 1303 - SOFIO, bul. "Hristo Botev" 97, BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO.

---

El BOLETIN de Hispanujo:

FUNDACION "ESPERANTO"
Internacia Literatura Konkurso
PREMIO "JUAN MIGUEL PIQUERO"

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj infanaj rakontoj...
Inf. Inés Gastón, Po de la Constitución, 35, 4. dcha. E-50001 ZARAGOZA.

**********

PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO (PIF)
okazos en Zagreb (Jugoslavio) de la 24-a de Aŭgusto ĝis la 1-a de Septembro.
En Esperanto prezentos profesiaj teatroj el 11 landoj i.a. Belgio...
Organizanto: INTERNACIA KULTURA SERVO, Amruseva, 5, YU-41000 Zagreb

Deziras korespondi:

Tapani Lappalainen, Kivalakotikylä, SF-37500 Lempäälä, Finnlando.

Silvan Mugliette, 7, St. Theresa str., Gtraxaq, Malta.

Wojciech Milewski, 88-140 Gniewkowo, skr. Poczt. 13, Pollando.

Jerzy Michalski, Ul. Pocztowa 9, 26-660 Jedlinŝk, Pollando.

---

OOMOTO

estas oomotisma universala-homamisma kulturponto inter Oriento kaj Okcidento. En la lasta numero aperis "Himno de Oomoto", poemo kaj muziko , kaj artikolo pri "Spirito de la Universala Blanka Frataro en Japanio" de Jo Haazen. La revuon oni povas aboni ĉe ELDONEJO & LIBREJO SONORILO, Doornstr. 22 Wilrijk.

AVENO

estas la bulteno de Asocio de Verduloj Esperantistoj kiuj subtenas la Verdan Movadon, t.e. la politika kaj eksterpolitika movado bazita sur ekologiaj principoj. sekr. J.Cl. Thumerelle, pl. de la Station 16, 7790 Warneton.

## NACIAJ KAJ INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

| | |
|---|---|
| 18-22.07 | Biciкla Karavano al la IJK - |
| 21-27.07 | Internacia Somera Esperanto-Universitato ISEU - V. Târnovo BG |
| 22-29.07 | 19-a Konferenco de ILEI - Kungälv S<br>kursoj, prelegoj, ekskursoj... |
| 22-31.07 | 18-a IREN, Internacia Renkonto Naturamika - Abaliget H - kursoj, ekskursoj, popoldancoj... |
| 22.07-11.08 | Kursoj - Grésillon-Baugé F - kursoj, teatro... |
| 22-29.07 | 41-a Internacia Junulara Kongreso - Eringerfeld D - diskutoj, konkursoj, ekskursoj, koncerto... |
| 27.07-03.08 | 11-a Konferenco de Neŭtrala Esperanto-Movado - Metz F |
| 27.07-03.08 | 58-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda SAT - Amersfoort NL<br>laborkunsidoj, ekskurso |
| 27.07-02.08 | 53a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj - Aŭgsburgo D |
| 27.07-02.08 | Interkibernetik '85 - Budapest H - prelegoj. |
| 27.07-02.08 | Ekumena Kongreso - Aŭgsburgo D |
| 27.07-02.08 | Antaŭkongreso Ferisemajno - Oberkirch D - ekskursoj, vizitoj |
| 29.07-03.08 | Biciklado de IJK al UK - |
| 31.07-01.08 | Seminario pri Gvidado kaj Informado en Landaj Asocioj - Aŭgsburgo D - prelegoj, debatoj |
| 01-12.08 | Karavano al la 70a Universala Kongreso de Esperanto - el Londono-Bruselo al Aŭgsburgo D ... |
| 03-10.08 | 70-a Universala Kongreso de Esperanto - Aŭgsburgo D<br>kunsidoj, kursoj, ekzamenoj, nacia, arta, muzika, teatra spektakloj, ekskursoj...<br>22-a Internacia Infana Kongreseto - Aŭgsburgo D - vizitoj, ekskurso, dancado, kantado... |
| 06.08 | Jarkunveno de Eŭropa Esperanto-Unio - Aŭgsburgo D<br>Jarkunveno de Eŭropa Esperanto-Centro - Aŭgsburgo D |
| 09-16.08 | PSEK (Pola Studenta Esperanto Komitato)-Aranĝo - Krakovo PL - prelegoj, laborgrupoj, eksursoj, dancado, kanto ... |
| 11-16.08 | 23a Pola Esperanto-Kongreso<br>2a Internacia Kongreseto de Kastora Klubo - Poznań PL<br>lingvo-lernado, ekskurso, vizito, konkursoj, filmoj.. |
| 11-17.08 | Postkongresa Vojaĝo tra Aŭstrio - A - vizitoj kaj ekskursoj |
| 11-18.08 | Postkongreso - Kronach D - vizitoj, ekskursoj |
| 11-24.08 | Informatiko per kaj pri Esperanto - Grésillon-Baugé F - kursoj |
| 15-22.08 | Somera Esperanto-Lernejo - Krakovo PL - kursoj, vizitado, ekskursoj, dancoj, kantoj... |
| 15-31.08 | Internacia Esperanto-Seminario - Borima BG - kursoj |
| 16-24.08 | Fervojista, Aŭtomobilista, Boatista Renkonto Internacia FABRI - Verőcemaros H |
| 16-31.08 | Flugkaravano al la Turismaj Esperanto-Tagoj en Nord-Ameriko - el Varsovio-Bruselo al CND kaj USA... |
| 18.08-01.09 | Renkonto de blindaj kaj ne-blindaj Esperantistoj - Grésillon-Baugé F - kursoj, kulturaj aranĝoj... |
| 16-31.08 | 4a Int. Familia Feriado "Esperanto Hejme" - Międzygórze PL - kursoj, konkursoj, prelegoj, diapozitivoj, dancoj, ekskursoj... |
| 24.08-01.09 | Pupteatra Internacia Festivalo PIF - Zagreb YU |
| 02-15.09 | 1a Int. Esperanto-Feriado "Adiaŭ Somero" - Międzygórze PL - kursoj, konkursoj, prelegoj, diapozitivoj, dancoj, ekskursoj... |
| 08.09 | 9-a Internacia Esperantista Pilgrimado al la Virgulino de la Malriĉuloj - Banneux B |
| 11-17.09 | Internacia Simpozio "Esperanto en Turismo" - Pisanica BG - ekskursoj... |
| 17-30.09 | 21a Int. Esperanto-Feriado "Ora Pola Aŭtuno" - Międzygórze PL - kursoj, konkursoj, prelegoj, diapozitivoj, dancoj, ekskursoj... |
| 18-26.09 | Internacia E-Seminario-feriado - Velingrad BG |
| 28.09 | Trilanda Renkontiĝo - Stolberg D |



## 70-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Aŭgsburgo (FR Germanio) 85.08.3 - 10

= UKE = EEC == UKE = EEC == UKE = EEC == UKE = EEC == UKE = EEC == UKE = EEC =

Eŭropa Esperanto-Centro

MARDE LA 6a DE AUGUSTO dum la Aŭgsburga UK: JARKUNVENO DE EEC: ĈIUJ BONVENAJ

!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!! UKE !!!!!!

71-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
25 jul - 2 aŭg 1986
Pekino, Ĉinio

Ni atentigas niajn belgajn gekongresontojn ke ili facile povas aliĝi al la Universala Esperanto-Kongreso pere de Belga Esperanto-Federacio, sendante la pagon al pĉk 000-0163434-86 de BEF kaj la aliĝilon al la kasisto, Jules Verstraeten, St.Bernardsestw. 1078, 2710 Hoboken.
Ankaŭ tie oni ricevas ĉiujn informojn kaj aliĝiloj estas disponeblaj.
Laŭ nuna kurzo de Guldeno ĉe la plimultaj bankoj en Belgio (±18.13 BF), ni indikas ĉisube la kongreskotizojn en nia nacia mono:

| Kongreskotizoj validaj ĝis | 85-08-15 | 85-12-31 |
|---|---|---|
| 1. Ne individua membro de UEA | 2720 BF | 3400 BF |
| 2. Individua membro de UEA | 2176 BF | 2720 BF |
| 3. Kunulo/junulo/handikapulo -ne individua membro de UEA | 1632 BF | 2040 BF |
| 4. Kunulo/junulo/handikapulo individua membro de UEA | 1088 BF | 1360 BF |

La kurzo ĉe ASLK/CGER estas meze pli avantaĝa...Krome kurzoj de valutoj daŭre ŝanĝiĝas! Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos). Por malgrandigi la riskojn por la peranto, la aliĝontoj povus pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por la Federacio.
Anticipan dankon!

J.V. - A.MG.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$
$$ Aliĝu pere de BEF = subtenu la landan Esperanto-movadon ! $$
$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

28 SEPT. "TRILANDA RENKONTIĜO"

9h Bügerhaus, Konrad-Adenauer-Str. 121, Stolberg-Busbach.
Inf. Mercedes Moritz, Im Römerfeld 44, D-5180 Eschweiler, Tel. 02403 66888

## IOM PRI LA HISTORIO DE LA TRILANDAJ RENKONTIĜOJ

La 6-an de majo, D-ro P. Denoël, la sola restanta el la fondintoj de la Trilandaj Renkontiĝoj, parolis ~~pri~~ ilia Historio. La 1-an de Aŭgusto 1931, okaze de internacia manifestacio kontraŭ la militdanĝeroj en Lieĝo, hazarde renkontiĝis kelkaj esperantistoj el Liège kaj Düren. Sekvis interŝanĝoj de korespondado, el kio rezultis la <u>1-a Trilanda Renkontiĝo</u> en Merkstein (Nederlando) la 13-an de decembro 1931. Biciklis tien 11 samideanoj el la Lieĝa regiono. Poste sekvis similaj renkontiĝoj en Aachen (marto 32), en Lieĝo (Pentekosto 32), en Heerlen (novembro 32), en Düren (meze de januaro 33 — du semajnojn antaŭ la Hitlera regado). Dum la sekvantaj jaroj la T.R. okazis nur en Nederlando kaj en Belgio (Verviers, Herstal, ktp.), kun la kaŝita partopreno de germanaj gesamideanoj.

Tiuj T.R. havis jenajn karakterizojn : ili kunigis esperantistojn el la landlimaj regionoj, esence el la urboj Liège-Verviers, Aachen-Düren, Maestricht-Heerlen — la organiazntoj kaj partoprenantoj apartenis ĝenerale al la esperantista laborista movado (S.A.T. kaj Landaj Asocioj, A.E.O.P. ktp.). S-ro J. Hérion, prezidanto de la neŭtrala Grupo en Verviers ofte ĉeestis, — tiuj T.R. estis amasaj kunvenoj : ekzemple 300 en Heerlen, 450 en Düren. La sukceso de tiu movado venis de kelkaj favoraj kondiĉoj : proksimeco de la grupoj (ne malofte oni povis bicikle vojaĝi), malmulteco de elspezoj (oni tranoktis kaj eĉ manĝis ĉe samideanoj), kvankam la Renkontiĝoj regule daŭris 2 aŭ 3 tagoj. La entuziasmo estis granda, multaj interamikiĝis, eĉ ekster la Renkontiĝoj oni vizitis unu la alian.

Por ne konkurenci la aliajn Esperanto-organizaĵojn (UEA, SAT) la movado por la T.R. ne estis strukturita. Ekzistis nek komitato nek statuto. Lambertine Drèze longtempe funkciis kiel sekretariino. Karl Mauriĉ, hungara rifuĝinto vojaĝis inter la grupoj. Estis eldonita monata gazeteto (kvarpaĝa — presita ĉe Biblio, Pl. St-Lambert — la unua redaktoro estis P. Denoël, kun Jean Dehareng kiel administranto). Tre aktiva estis la frato de s-ino Denoël, Martin Fehr el Düren. Pro tiuj Renkontiĝoj la grupoj plifortiĝis. En la regiono Liège-Verviers ekzistis tiam forta asocio (A.E.O.P.), kun 200 membroj, pli ol 10 grupoj, 15 kursoj, el kiuj unu en la sola radiostacio en la regiono :"Radio-Liège".

Dum la milito ĉesis ĉiu Esperanto-movado, ankaŭ la T.R., kvankam la individuaj esperantistoj senbrue interrilatis. Post la milito, tuj kiam la translimaj rilatoj estis eblaj, rekomenciĝis la T.R. Geamikoj H. kaj E. Dujardin rememorigis ke la unua okazis en 1946 en Valkenburg (Ned.). Pro la teruraj tagoj de la milito malaperis pluraj amikoj el la 3 regionoj (inter ili nia karmemora Jean Dehareng, mortigita de la Gestapo). Estis tamen kelkaj modifoj de tiuj novaj T.R., kompare al tiuj de antaŭ la milito : la ritmo estis ĝenerale de 1-taga kunveno dufoje en la jaro, alternative en la tri regionoj, kaj la neŭtraleco rilate la politikon estis strikte respektata. Pro la fakto ke ili okazas dum la semajnfino, la di-servo estas antaŭvidita. Anstataŭ la antaŭmilita "<u>Fajrero</u>", de tempo al tempo aperis bulteneto (kun titoloj "Triangulo", aŭ similaj).

Pro ilia sukceso kaj efikeco, oni konis tiujn T.R. : esperantistoj el pli foraj lokoj partoprenis ilin (Antverpeno, Charleroi, ktp.) — similaj manifestacioj okazas aliloke (ekz. la "Markolaj Kongresoj" inter grupoj de Nordfrancio, Sudanglio, Okcidenta Flandrujo) — oni iafoje altiris niajn T.R. al alispecaj pli imponaj eventoj (Naciaj kongresoj), sed la marĝena pozicio, kiun oni rezervis al ni, ofte "malbongustis" !

Nacilingva gazetaro kaj oficialaj instancoj plurfoje interesiĝis al al tiuj regulaj kunvenoj de diversnaciaj homoj parolantaj unu lingvon. Iam la fondinto de la asocio "La 3 frat(in)aj Urboj" sendis observanton. En 1981 altranga funkciulo de Provinco Liège iniciatis la kreon de la Ateliero de Aubel. Krom tiaj favoraj influoj al la movado, restas por la T.R. la esenca avantaĝo por esperantistoj, internacie praktiki sian lingvon.





<u>20a Markola Kongreso, Folkestone</u>

La venontjara Markola Kongreso okazos de la 18a ĝis la 20a de aprilo en Folkestone.

Loĝado mendebla rekte de Southcliff Hotel, 25 The Lees, Folkestone CT20 2DY (tel. 0303-56075). La hotelo situas sur la klifo fronte al la maro, 1500 m. okcidente de la haveno. Prezo: GBP 46,00 por du tagoj, ekde vespermanĝo vendrede, por vespermanĝo, lito, matenmanĝo kaj bufeda lunĉo, inkluzive AVI.

Antaŭpago por loĝado: GBP 10.00 (Ten English Pounds) al Southcliff Hotel (Folkestone) Ltd per ĉeko (Eurocheque). Uzantoj de postĝirkonto trovos instrukciojn en la BCH-broŝuro (p. 36, 9.1.3).

Bonvolu mencii specialajn bezonojn kun la antaŭmendo. Estas konsilinde ke oni frue mendu unupersonan ĉambron. Aliaj informoj aperos poste. Bonvolu skribi pri ĉio rilate al la hotelo rekte al la hotelo. Pri ĉiuj aliaj aferoj bv. peti informojn de: Frances Randall, 5 Wiltie Gardens, Folkestone CT19 5AX (0303-54550).

<u>Renkontiĝo The Friars, Aylesford</u> (1985.09.27-29)

Kotizo proksimume GBP 25,00. Antaŭpago GBP 2,00 al Mollie Buckle, 53 South Street, Barming, Kent ME16 9EX (tel. 0622-26548), menciante tipon de loĝado.

Vojaĝo: trajno de Dover kaj Folkestone; ŝanĝu en Ashford; buso (155) de Maidstone East kaj Bus Station al The Friars.

70-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Augsburgo (FR Germanio) 85.06.3 - 10

Ĝis la eldono de la Kongresa Libro, aliĝis 1788 kongresanoj el 51 landoj. Inter ili estas 70 partoprenontoj el Belgio !

---

Perloj * DE JUGOSLAVA LITERATURO

La societo "RADOMIR KLAJIC", Terazije 42, 11000 Beograd/Jugoslavio sendis al BEF prospektojn pri la biblioteko "PERLOJ de jugoslavia literaturo", kaj pri la romano-kroniko "PONTO SUPER DRINO" de I. Andrić...je via dispono !

---

ESPERANTO-CENTRO PADERBORN
estas eldonisto de la verkoj de Rikardo Ŝulco !

Esperanto*Centro Paderborn
dissendas 32-paĝan Cirkuleron: ĝi enhavas multajn valorojn informojn pri kaj por la Esperanto-movado, liston de novaj plibroj, indikojn pri la UKE 85 kaj 86... Petu vian ekzempleron. Se vi havas, bv. aldoni 2 respondkuponojn por kovri la kostojn. Skribu al Esperanto-Centro, poŝtfako 1450 D-4790 Paderborn
Dir. Hermann Behrmann.

****************

3-a Internacia Kanzon-Teatra Festivalo
PARIZO- 23 kaj 24-ajn de novembro 1985

Pasintan jaron oni prezentis teatrajn trupojn el Francio kaj Jugoslavio, kaj kantistojn el Belgio, Francio, Germanio, Italio, Pollando, kaj kabaredan francan trupon. Por pli detalaj informoj aŭ partopreno, turnu vin al:
U.F.E. (Internacia Festivalo), 4bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris.

*******************

9a INTERNACIA PILGRIMADO AL LA VIRGULINO DE LA MALRIĈULOJ EN BANNEUX

Tiu jara esperantista pilgrimado okazos dimanĉe la 8an de septembro 1985 ekde la 9a ĝis la 17.30a. La temo, enkondukita de patro Louis Bourdon, o.p., estas ĉi-jare: "Frata karitato, fundamento de paco".

Post la eŭkaristia kuncelebrado en esperanto, esperanta partopreno en la publikaj preĝoj por la malsanuloj.

Ebleco iri survoje tra Bruselo, halti kaj loĝi tie ekde vendredo vespere. Informu ĉe Barbara, telef. (02) 218.218.9.

Por pluaj informoj, turnu vin ĉe: Pastro Muller, 207 rue F. Lefebvre, 4420 Rocourt, aŭ Raymond Lecat, 123 av. Gen. Eisenhower, 1030 Bruselo.